

La Espero

1974-2

Svenska Esperantotidningen

Fondita en 1913

LINGVOPREMIO al JAN STRÖNNE

Ciun trian jaron ekde 1943, Stockholms Fredsförening (la stokholma pacasocio) disdonas lingvopremion el la fondaĵo Josefina Larsson. Fine de januaro oni disdonis la 11-an premion (por 1973), kaj ĉi-foje oni donis ĝin al Jan Strönné, prezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio.

La transdono okazis en ĉambro de la Nordiska Muséet. Holger Eriksson, prezidanto de la stokholma pacasocio, diris ke la premio ĉiam iris al esperantistoj. La komitato plurfoje havis kontaktojn i. a. kun profesoro Collinder por interkonsiliĝo, sed ĉi-foje oni opiniis tute memklare ke la premion ricevu esperantisto.

En la saloneto troviĝis ankaŭ antaŭa premiito, Tiberio Morariu. Pluraj aliaj svedaj esperantistoj troviĝas en la listo de la premiitoj, ekzemple Anna Alamo-Sandgren, Einar Dahl kaj Ernfrid Malmgren. Ankaŭ kelkaj nesvedoj ricevis ĝin, laste Andreo Cseh.

Rektoro Karl Söderberg diris kelkajn vortojn pri la ĉi-jara premiito. Li speciale menciis ke Jan Strönné aranĝis la kongreson en Malmö en 1948, aranĝis la konatajn semajnojn en Frostavallen, kaj funkciis kiel prezidanto de SEF jam dum 26 jaroj.

Ulla Luin



La prezidanto de la Stokholma Pacasocio transdonas la lingvopremio al Strönné.

**VARSĜOD!
HĀR KOMMER ETT PAKET
FULLY AV NYTTIGA
ÖVERRASKNINGAR.**



Vi har gjort ett häfte som talar om olika sätt att informera. Inga teoretiska resonemang. Rakt på sak. Det är en idésamling och en katalog på allt informationsmaterial som finns till klubbarnas förfogande.

Här presenteras: olika små affischer, broschyrer, föredrag, olika flygblad, en affischutställning, förslag på böcker och tidskrifter lämpliga att ställas ut på en utställning, annonser, in-

formationskuvert till intresserade... Men framför allt finns många praktiska tips med om vad en klubb kan göra, när den vill informera om esperanto — både i smått och stort.

Din klubb har redan fått häftet. Se till att innehållet i det diskuteras och häftet kommer till användning.

ESPERANTOFORBUNDET

Redaktoro:

Tiu ĉi numero iomete malfruas pro cirkonstancoj ekster nia kontrolo, sed ĝi certe tamen atingos vin en tre bona tempo por via aliĝo al la Jarkongreso de SEF en Borlänge.

Kiel vi vidas, la dalekarlianoj faris tre riĉan kaj ampleksan programon, kaj la sezono, pentekosto, certe estas la plej bona por viziti unu el la plej belaj regionoj de Svedujo.

La jarkongreso per si mem estas grava, ĉar estas ja la sola fojo dum la jaro kiam la estraro de SEF havas eblecon renkonti reprezentantojn de la kluboj kaj distriktoj kaj kune kun ili diskuti pri la estonta laboro. Bedaŭrinde kutimas manki multaj kluboj je niaj jarkongresoj; la kluboj ja ĝenerale estas malgrandaj kaj ne havas eblecojn pagi la kostojn de siaj reprezentantoj, sekve dependas de la individua membro mem, ĉu li povos je sia propra kosto partopreni kaj reprezenti sian klubon.

SEF tamen kontribuas iom al la vojaĝkostoj, kaj estas vere dezirinde, ke la kluboj kaj iliaj membroj faru ĉion eblan por resti reprezentitaj je la jarkongreso. Aliĝu kiel eble plej baldaŭ!

Ni ne publikigas iun grandan artikolon pri la urbo de la ĉi-jara Universala Kongreso. Hamburgo ja estas jam tre konata. Anstataŭe ni preferis prezenti Kronach, la urbo de la postkongreso, kaj ni volas ankaŭ atentigi vin pri la kongreso de gejunuloj en Münster, kiu ja okazos tuj post la UK. Kaj antaŭ la UK vi havas i. a. la somerajn kursojn en Helsingör, kiujn ĉiam fidele aranĝas s-ro Friis. Do, la somero prezentas eblecojn ĉiuspecajn!

Skribante tiujn ĉi liniojn mi jus revenis el Kramfors, kie la esperantistoj en kunlaboro kun la abstinencaj organizaĵoj aranĝis semajnfinan kurson pri la mondlingva problemo. Pri tiu sukcesa arango ni raportos en la sekvonta numero.

Ni diskutis tie i. a. pri la "anglino" aŭ pli ĝuste "amerikanigo" de Svedujo. Kaj hejmenveturante mi vidis — meze en la kamparo apud iu ŝoseo — grandegan ŝildon kun la vorto "Drugstore". En mia junaĝo oni ankoraŭ nomis tiujn ejojn, kie oni povas aĉeti varmajn kolbasojn kaj senalkoholajn trinkaĵojn per ilia sveda nomo "korvkiosk". Hodiaŭ estas jam "Drugstore".

En la vagonaro iu junulo kiu

KLUBA VIVO

En **Tibro** la Studasocio de la Liberaj Eklezioj (Frikyrkliga Studieförbundet) iniciate de Stig Kinnander havas esperantokurson por komentantoj. Ses patroprenas kaj Bengt Alsén gvidas. En la Sveda Misia Asocio en Tibro kelkaj geknaboj komencis lerni laŭ la Jamborea Lingvo.

Sösdala. La studorganizaĵo NBV (abstinenculoj) havas kurson en esperanto. Gvidas Sören Sandqvist. En la gazeto Norra Skåne aperis longa artikolo pri esperanto.

Gotenburgo. La esperantistoj akiris novan ejon en Arbetarinstitutet, Magasinsgatan 23.

40-JARA JUBILEO

Karlskoga Esperantosocieto la Aglo aranĝis sian 40-an jarkunvenon la 16an de februaro. Multaj membroj kolektiĝis, ankaŭ eksmembroj kaj gastoj, inter ili Sune Ahlm el Vargön, unu el la fondintoj de la klubo. En la jarraporto oni povis legi, ke la klubo vivo ne estis tre vigla — tamen oni reelektis la estraron (sekr. noto: Oni ĝuas laŭ merito). Tamen la ekonomia stato estas sufiĉe bona laŭ la revizia raporto.

3 novaj membroj aliĝis. La klubo nun havas 27 membrojn. Unu multjara membro mortis dum la jaro.

En la lastaj du semajnoj la migranta ekspozicio, komponita en Västerås, estis montrata en la urba biblioteko. La lokaj gazetoj faris artikolon kun fotoj. Ni esperas nun, ke la interesuloj partoprenos la kurson, kiun ni startos kun apogo de ABF.

Sed por reveni al la jarkunveno: Sune Ahlm rakontis pri la fondiĝo kaj la unuajn jarojn de la klubo vivo kaj montris multajn interesajn bildojn el malnovaj tagoj. La esperantoklubo de Örebro transdonis libron okaze de la jubileo. Nia tirharmonikisto, ankaŭ li nestoro kiam temas pri nia muziko, sukcesis logi al danĉado. Pripensu nian estimandan mez-aĝon!

En paŭzo Sune montris, ke li ankoraŭ estas bonega manipulisito.

Ax, Td


NI HAR GLOMT

betala UEA-avgiften för 1974. Postgiro är 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).

Skriv MA på talongen, betala 60 kr. och Ni får årsboken och varje månad tidn. Esperanto.

Skriv MS på talongen, betala 90 kr. och Ni får detsamma men räcker UEA en hjälpande hand. Det behövs faktiskt.

gustumis iom da trinkaĵoj kiuj evidente ne estis senalkoholaj, volis pardonpeti al fraŭlino, ĉar li malatentis malfermi al ŝi la pordon. Li turnis sin al ŝi, riverencis tre ĝentile kaj diris en tiu lingvo, kiu estas ĉe ni tiel populara: **Exclude me!** Laŭ miaj malmalmodernaj scioj, tiu vorto signifas "ekskludi" kaj kiam oni pardonpetas en la angla oni devas diri "excuse me". Sed kiom gravas tiaj bagateloj. Ĉu tamen ne ege altiĝis la lingva kaj spirita kulturo de la svedoj?



HELINGÖR 1974

tuj antaŭ UK de Hamburgo

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21.—27. de julio en La Internacia Altlernejo de Helsingör. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Hamburgo.

Karavanvojaĝo el Helsingör al Hamburgo, kaj reen, estos aranĝata per trajno speciala por la kursanoj.

Programo senpage havebla ĉe

L. FRIIS

Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando

Borlänge

I DALOM — där trivs vi

och den trevnaden vill vi dela med oss av till alla Er, som kommer att besöka SEF:s 68:e årskongress i Borlänge den 1—3 juni.

Vi hoppas, att vårt landskap just under denna pingstheg skall bjuda Er allt av den skönhet det är mäktigt att uppbjuda, glittrande vatten, mäktiga barrskogar, som klättrar upp för dess höjder, klasar av röda stugor bland björkar, som just klätt sig i sin nya, fräscha, ljusgröna lövskrud och med stammar, som tävlar i vithet med stugornas knutar. Vi hoppas även att myriader av de vitaste vita körsbärsblommor skall kanta vägen upp genom Siljansbygden, där dessa fruktträd är så rikligt förekommande.

Efter vår utfärd i denna natursköna del av Dalom, och efter att ha avverkat det högtidliga öppnandet med högtidstal av JOHN BERGGREEN från Oslo, avnjutandet av en härlig bankett, som Borlänge kommun bjuder på, och själva årsmötet kommer våra unga drivande krafter "la gesinjeroj Luin" att känna oss på pulsen under hela tre timmar på kongressens sista dag. Säkert har vi då fått krafter till ett intensivt och fruktbringande deltagande i detta för vår rörelses framtid så viktiga arbete.

Ett villkor för att du skall bli delaktig av allt det vi erbjuder, är att du **senast den 15 maj** insänder den anmälningsblankett, i form av ett pg-inbetalningskort, som medföljer detta nummer av La Espero. Fler blanketter kan rekvideras från Esperantokongressen, Grådavägen 36, 781 00 Borlänge (tel. 023/256 35), eller från SEF, Pack 122 04 Stockholm-Enskede (sekr. Ulla Luin har telefon 08/712 82 91).

Kostnader och beställningsrutin framgår av anmälningsblankettens övre del, som avrives och behålles av Er.

Förutom det förmånliga pris, vi genom Borlänge Esperantoklubbs medverkan kunnat erbjuda våra SEJU-aner (kr. 100:— i ett för allt vid förläggning i dubbelrum) har Dalarnas Esperantodistrikt beslutat utdela fyra stipendier till ung eller gammal esperantist, som därtill gjort sig förtjänt genom någon insats, i kongressbiljetter till kr. 115:— vid dubbelrum och 135:— vid enkelrum. Stipendiaterna utses av LJK i samråd med SEF eller SEJU. Ansökan göres skriftligen till Esperantokongressen, Grådavägen 36, 781 00 Borlänge **senast den 5 maj**. Uppgiv i an-

sökan ålder, merit inom esperantorörelsen, ev. ekonomi samt minst en referens.

Alla arrangemang, måltider, sammanträden, bankett och inkvartering kommer att ske å Hotell Brage, ett synnerligen trevligt och modernt hotell.

Till våra bilburna kongressdeltagare vill vi meddela, att det strax intill hotellet finnes tillgång till fri parkering under hela helgen.

Kongressens adress: Esperantokongressen 1974, Grådavägen 36, 781 00 Borlänge. Tel. 0243-256 35 E. Lundvall.

Postgiro: 81 01 74-3 Esperantokongressen 1974, Borlänge.

Väl mött i DALOM!

LJK

Priser

För deltagare i alla arrangemang: Inklusivt kongressavgift, två övernattningar, två frukost, två lunch, supé samt utflykt med kaffé och té-supé.

i dubbelrum 205:— i enkelrum 225:— för SEJU-medlemmar:

i dubbelrum 100:— i enkelrum 120:—

För deltagare i enstaka arrangemang:

Kongressavgift (obligatorisk):

Ej SEJU-medlem 25:—

SEJU-medlem 10:—

Dubbelrum per person o. natt 35:—

Enkelrum per person o. natt 45:—

Frukost 5:—

Lunch 25:—

Supé, Bankett pingstafton .. 40:—

Utflykt med kaffe o. tesupé 35:—

Programo de la 68a jarkunveno de SEF Borlänge

Pentekoste 1—3 de junio 1974 en Hotell Brage

PENTEKOSTA VESPERO, SABATE 1 JUNIO

- 15.00 Malfermo de la kongresa oficejo
- 16.00 Estrarkunsidoj de SEF kaj SEJU
- 17.00 Solena malfermo de la jarkongreso
- 18.30 Jarkunsido de Eldona Societo Esperanto
- 20.00 Bankedo. Salutoj al la jarkongreso, Muziko. Dancado.

PENTEKOSTA TAGO, DIMANĈE 2 JUNIO

- 08.00 Matenmango
- 09.00 Jarkunsido de SEF
- 12.15 Lunĉo
- 13.30 Fakaj kunsidoj
- 14.00 KELI invitas al soleno en Missionskyrkan en Borlänge
- 15.00 Autobusoj startos por ekskurso
- 16.00 Kaftrinkado en Insjón
- 17.00 Vizito al la teksejo Masen
- 18.00 Daŭrigo de la aŭtobusa veturo al Siljansnäs
- 19.30 Supeo kaj distra vespero en Hotell Siljansnäs
- 22.00 La aŭtobusoj reiras al Borlänge
- 23.00 Reveno al Hotell Brage

DUA PENTEKOSTA TAGO LUNDE 3 JUNIO

- 08.00 Matenmango
- 09.00 Enkonduko pri kluba informado kaj grupa laboro. Diskutado
- 12.00 Ĝisrevida lunĉo
- 13.30 Fermo de la kongreso

BREVMÄRKE HAMBURG

Hjälp till att göra reklam för världskongressen i Hamburg genom att på all post sätta kongressens brevmärke. Varje karta innehåller 10 märken.

1 karta kr. 1:50

3 kartor kr. 3:25

Beställes genom att sända likvid till postgiro 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, Specialkonto, Malmö).

Lasta dato por manuskripto por la sekvonta numero de La Espero: 30 aprilo.

ÅRSMÖTE

Härmed kallas andelsägarna i

FÖRLAGSFÖRENINGEN

ESPERANTO u. p. a.

till ordinarie årsmöte

lördagen den 1 juni 1974

kl. 18.30

på Hotell Brage i Borlänge.

Ombud för andelsägande föreningar skall inlämna fullmakt före årsmötets början.

Ärenden enligt stadgarna § 14.

Styrelsen

Res till Hamburg

VET NI...?

att Hamburg ligger nära oss. Passa därför på och bli med på en esperantovärldskongress.

att på annan plats i tidningen står meddelande hur man skall förfara vid anmälan.

att den s. k. Dua Bulteno nu skall utsändas eller kanske redan kommit, då detta läses. Sänd inga blanketter eller pengar förrän Ni fått SEF:s cirkulär härom (tillställs alla som anmälts genom SEF).

att ett särskilt tåg med dansvagn utgår från Köpenhamn. Deltagarna i Helsingörs-kursen följer med. Upplysn. på annan plats i tidningen.

att Sommar-Universitetet som vanligt blir intressant med många föreläsare, och "Oratora Konkurs" för ungdomar har fått ytterligare ämnen.

att många intresseorganisationer, fler än vanligt, får plats på kongressens digra schema.

att var och en redan nu kan skriva till Fremdenverkehrscentrale Hamburg E. V. D-2 Hamburg 1, Bieberhaus; Germanujo, och anhålla om en broschyr på Esperanto över Hamburg. Skriv på Esperanto.

att efterkongress kommer i Kronach.

att intresset för kongressen i Hamburg är mycket stort bland esperantisterna i alla länder.

att kongressen kommer att äga rum i den toppmoderna Kongress-Centrum, Hamburg, nybyggd så

sent som 1973. Belägen mitt i staden. Alla arrangemang i kongresejo.

att programmet som vanligt upptager teaterafton, internationell bal, bankett, "Internacia vespero", Interkona vespero, filmförevisningar och mycket annat.

att utfärder (som vanligt vid kongresserna) går åt olika håll under veckan. Intressanta, givande och i sällskap med esperantister från när och fjärran.

att en särskild debatt skall äga rum kring ämnet "Landaj revuoj en Esperanto — ĉu utilaj?", ett verkligt intressant ämne för alla som deltar i E-arbetet.

att en bulgarisk teatergrupp från Sofia presenterar på teateraftonen Beaumarchais' komedi "Barberaren i Sevilla" (Rossini har gjort en opera av denna med samma namn).

att ungdomarnas världskongress kommer i Münster 4—10 aug. omedelbart efter den stora världskongressen.

att inemot 40 facksammanträden i olika ämnen kommer att äga rum. Det är bara att välja.

att UEA:s generalaj kunveno som vanligt blir intressanta och innehållsrika.

att — om man dömer efter antalet anmälningar — kongressen i Hamburg ser ut att kunna bli den största väst-europeiska E-kongressen under de senaste tio åren.

VAR MED — DU OCKSÅ!

Gruppresa till Hamburg

En gemensam skandinavisk tågreses till världskongressen i Hamburg 27 juli—3 augusti ordnas från Köpenhamn. Bl. a. planeras musik och dans i de reserverade vagnarna. Arrangörerna åtar sig att reservera platser i anslutningar från Stockholm, Oslo och Göteborg.

Det blir en litet annorlunda kongressresa med internationell atmosfär redan från Köpenhamn.

Program och prisupplysningar från KONGRESVOJAGÖJ, Lovetandsvej 31, 2700 Brønshøj, Danmark.

NI KORE INVITAS VIN

al niaj trilandaj arangoj, somere 1974.

1) Turismaj tagoj en Aalborg kaj Gotenburgo kun po du tranoktoj en ambaŭ urboj. ŝipveturado kaj aŭtobusaj ekskursoj. Ni vizitos belegan parton de la arkipelago de Okcidenta Marbordo. Kunestado surŝipe kaj en la hoteloj. Ekstra: Tri kvar valoraj prelegoj kun debatoj. Tempo: 22—26 julio.

2) Komuna ŝipveturado al Germanio por tusemajna partoprenado en la 59-a UK en Hamburgo. Bonkvallita hotelo rezervita. Tempo: 26 julio—4 aŭgusto.

Petu informon pri nia amikeca kunestado. Partoprenu unu aŭ ambaŭ arangojn. Favoraj prezoj — bonkvallita, trankvila programo.

INTER — Agadgrupo por Esperanto

Box 55028, 400 53 Göteborg
Telefona: (031) 48 95 97

Postkongreso en Kronach

Post la Universala Kongreso en Hamburgo okazos en Kronach, norda Bavarujo, postkongreso de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto. La riĉa programo enhavas multajn ekskursojn, folkloran vesperon, koncertojn, prelegojn kaj unu diskuton kun urbanoj. Konstanta adreso: Fremdenverkehrsamt - Esperanto - Postfach 510, D-KRO. NACH, Germ. Fed. Resp.

Preskaŭ meze inter Berlin kaj München, en la plej norda parto de Bavarujo (11°20' E, 0°14' N) situas la suprafrankonia urbo Kronach (kronaĥ), ideala loko por trankvila feriumado, ĉirkaŭita de abundaj blueverdaj arbaroj, verdaj valoj kun tri ĉi tie kun-fluantaj riveretoj (Hasslach, Kronach kaj Rodach) kaj allogaj montetoj. Tiu ĉi rava pejzaĝo invitas al longaj promenadoj en ankoraŭ pura aero. Alte super la mezepoka, ege idila urbo kun trabfakonstruaĵoj kaj turetoj tronas la fortikaĵo, nomita "Feste Rosenberg", unu el la plej grandaj kasteloj en tuta Germanujo kaj juvelo de mezepoka konstru-arto, kiu nevenkete transdaŭris ĉiujn uraganojn de la Tridekjara Milito (1618—48), kaj kiu nuntempe, plurdoma kastelo kun libere staranta turego, enhavas i. a. junulargastejon ĝaj regionan muzeon kun raraj valoraĵoj. Oni prezentas ekzemple la ilaron kaj kostumojn de la flosistoj, kiuj dum jarcentoj transportadis la arbotrunkojn en longegaj flosoj rivervoje ĝis Nederlando. Vidindas ankaŭ la kolektajo de pafistaj cel-tabuloj kaj la subteraj koridoroj, kiuj siatempe ebligis savan eliron al la loĝantaro de la kastelo dum multaj sieĝoj. Grandioza artaĵo estas la stelforma murego, kiu ĉirkaŭas la tutan fortikaĵon. Ne nur de sur la kastela teraso, kie troviĝas restoracio, sed ankaŭ de sur la oriente situanta monto (Kreuzberg) kun antaŭnelonge konstruita modernega liberaera banejo kun tutjara varmigitaj, kristalklara akvo kaj vitra naĝhalo uzebla dum vintro, la vizitanto ĝuas grandtraĵtan panoramon, en kiu la silueto de la urbo, la majesta fortikaĵo sur la "rozmonto" kaj la vasta monteta ĉenaro unuigas al pitoreska bildo.

Lucas Cranach (lukas kranach), kiu elektis la nomon de sia naskiĝurbo — propre li nomiĝis Müller — mondkonata pentristo kaj samtempulo al Albrecht Dürer (albreĥt direr), naskiĝis 1472 en la Supra Urbo (Obere Stadt). Liaj verkoj, kies vivanteco kaj detalemo estas ĉiam denove laŭditaj — li portretis ankaŭ sian ami-

kon, la religian reformiston Martin Luther — troveblas en multaj artgalerioj de Firenze ĝis Stokholmo. Kelkaj el ili estas ekspoziciataj en la salonego de la malnova urbodomo (Altes Rathaus).

La ekonomia strukturo de Kronach distingiĝas per ne-poluciaj industrioj, kiuj produktas ĉefe radio-kaj televidaparatojn, sonbendaparatojn, porcelanon kaj lignaĵojn.

La enurba kultura vivo koncentriĝas al la nova kaj belaspekta kultura halo (Kultur-Raum), kie regule okazas teatraj kaj muzikaj prezentaĵoj. Konata kant-ĥoro sub la direkto de Heiner Murmann, muzikedukisto en urba real-lernejo, posedas altan reputacion ĉe publiko kaj fakularo.

La pentraĵoj, gravuraĵoj kaj skulptaĵoj de Horst Böhm atingis vastan atenton en naciaj kaj internaciaj ekspozicioj.

La kulminon de la ĉiujaraj popularaj amuziĝoj, la Pafistan Feston (Schützenfest) meze de Aŭgusto, vizitadas miloj da homoj el la proksima kaj malproksima ĉirkaŭaĵo.

Afable loĝantaro, kiu parolas frankonian dialekton, kaj la konataj gastronomiaj specialaĵoj kontribuas al agrable restado en Kronach, kiu plenrajte nomiĝas "Perlo de la Frankonia Arbaro".

Venu, vidu, amuziĝu kaj ekkonu ĉi tiun amindan urbon, la homojn kaj la ĉarman pejzaĝon de ĉi tiu nordbavara regiono.

(Walter F. J. Walther)

Kronach —
idilia loko por trankvila ferumado.



En Hamburg:

DEBATO PRI LA GAZETARO

La Debato fariĝis de post sia enkonduko en la kongresan programon antaŭ kelkaj jaroj tre ŝatata ero, dum kiu ĉiu kongresano havas la eblecon defendi sian vidpunkton pri grava movada temo. La Debato en Hamburgo temos pri: "Landaj revuoj en esperanto — Ĉu utilaj?"

Unuflanke la bezono de enlanda organiza informilo kaj nacilingva informmaterialo, aliflanke la kontraŭdiro inter la ideo de landa revuo kaj la internacieco de la esperanta gazetararo — tio formas la kernon de la demando, kiu multe okupas la aktivulojn de la nuntempaj landaj esperanto-organizaĵoj. Ĉu la Debato ĉi-jara montros la vojon al solvo?

AKTUALA ĈEFTEMO ELEKTITA

La ĉeftemo de la 59a UK estos: "Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo". Ĝi estos traktita unuavice en la Dua Ĝenerala Kunveno de UEA, kaj enkonduka raporto aperos en la Kongresa Libro. Ankaŭ du el la temoj de la Oratora Konkurso kaj iuj prelegoj de la Internacia Somera Universitato estos ligitaj al ĝi. Abundaj ekzemploj en la nuntempa vivo aktualigas diskuton pri la konfliktoj de naciaj interesoj kaj ilia solvo en la kadro de internaciaj organizaĵoj.

SEF-AVGIFTER 1974

Direkt medlem med tidning . . . 25 kr
Ungdomsmedlem med tidning 10 kr
Familmjedlem utan tidning . . . 5 kr
Betala till SEF:s postgirokonto 20 12-3.

Klubbmedlem betalar till klubbens kassör den avgift som klubben bestämmer, och som innefattar avgift till SEF.

Ännu tid!

Vi upprepar anmälningsavgifterna till kongressen i Hamburg.

1. Kongresano, ne-membro individua de UEA: **285:—**.
2. Kongresano individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro (MJ): **176:—**.
3. Kongresano individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA): **151:—**. (151:—).
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1: **141:—**.
5. Edz(in) o de Kongresano en kategorioj 2 aŭ 3: **124:—**.
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara: **61:—**.
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara: **101:—**.
8. Blindul(in)o: **80:—**.

Ĉu ŝanĝi Esperanton?

"Nu, esperanto estas interesa — sed mi ja ne havas tempon lerni ĝin."

Ĉu vi rekonas la frazon?

La homoj kiuj diras tion estas por ni tre gravaj homoj. Se ni estus aliŝpeca organizaĵo, ili eble eĉ pagus iom por ricevi nian bultenon kaj sekvi nian agadon. Sed la esperanto-organizaĵoj suferas pro lingvaj malfacilaĵoj: niaj bultenoj estas en esperanto, kaj la kaŭzo kial la interesitoj ne pli interesiĝis eble estis ĝuste tiu: ke ili ne havas tempon lerni esperanton.

Ĉu oni do devas lerni esperanton por scii ĉu indas lerni ĝin?

NUNA REVUETO ESPERANTO-NYTT

Por tiuj al kiuj ni deziras fari daŭran informadon pri esperanto, ni (SEF) eldonas etan revuon 4-foje jare. Ĝi havas formaton A 5, kaj ampleksas 4 paĝojn.

Ĝin ni sendas al parlamentanoj, al bibliotekoj, al lokaj politikistoj kaj al interesitoj, grandparte laŭ mendoj de la kluboj. La membroj de SEF ne aŭtomate ricevas ĝin.

La gazeteto enhavas kutime unu ĉefan artikolon, verkita de la redaktoro (S. Öfors). Ĝi enhavas bazajn argumentojn por esperanto, ofte ĝi estas reago al io kion iu sveda gazeto skribis pri lingva problemoj aŭ esperanto. Krome ĝi enhavas malgrandajn notojn pri diversaj novaĵoj el la esperantomondo.

PLIGRANDIGO BEZONATA!

Prestigo: Multaj neesperantistoj nepre devas kredi ke Esperantonytt estas la organo de la svedaj esperantistoj. Ja ne eblas por ili scii ke krom ĝi aperas la multe pli granda kaj pli ofta La Espero, kaj ke aperas 3—4 aliaj esperantaj periodaĵoj nur en Svedio.

Ĉiu numero de Esperantonytt devus enhavi ion kio tuj dirus al homoj ke tio ĉi estas nur malgranda parto de la esperanta eldonado en Svedio.

Interesitoj: En la nuna malgranda formato tute ne ekzistas ebleco speguligi la riĉan kulturan vivon de la esperantistoj. Ankaŭ ne eblas bone raportari pri la diskutado kaj raportado pri lingvaj problemoj, kiun oni trovas en esperantaj revuoj, kaj tio ja parte estas destinita ne al la jam konvinkitaj esperantistoj, sed al la neesperantistoj.

En ĉiu numero de Revuo Esperanto, Heroldo, La Monda Lingvo-

Problemo ktp ekzistas bonaj kaj trudukeblaj artikoloj.

Membroj: La plej interesitaj interesitoj estas la membroj. Devus esti memklare ke ĉiuj membroj estu informitaj pri tio kion ni diras al eksteruloj pere de broŝuroj, informiloj ktp.

Iel necesas sendi Esperantonytt al la membroj, kaj inkluzivigi ĝin en la membrotizon.

Kontaktoj: Se iu ekinteresiĝas pri esperanto pro nia svedlingva informo revuo, li devas havi eblecon tuj kaj facile kontakti la sekretariejon por peti pliajn informojn aŭ membriĝi.

En ĉiu numero necesas spaco por respondkuponon.

Aktivigo: Estas rimarkeble ke la membroj ne sentas la saman respondecon pri Esperantonytt kiel pri La Espero. Tre malofte iu, krom la redaktoro mem, kontribuas al Esperantonytt per artikoloj, dum oni ofte vidas kontribuojn en La Espero.

Necesas integriĝi Esperantonytt kun la ĝenerala esperantovivo en Svedio en pli aktiva maniero ol nun, kaj necesas pli da spaco por ebligi publikigon de bonaj kontribuoj.

Rubrikoj: Oni povas rimarki en ĉiuj modernaj gazetoj ke la rubrikoj tre multe gravas. Ofte la rubrikoj estas la sola teksto kiun la leganto rigardas.

Necesas pli da spaco por fari pli grandajn, kaj pliajn, rubrikojn. Ankaŭ malgrandaj notoj havu rubrikon.

PROPONO

Sajnas ke multajn el tiuj ĉi postuloj oni povus kontentigi, se Esperantonytt

a. aperus en la formato de La Espero (A 4), kun 4 paĝoj

b. estus distribuata al la membroj kiel mezaj paĝoj de La Espero, kaj krome, kiel nun, aparte al neesperantistoj.

PROBLEMOJ

Tia ŝanĝo, se oni decidus fari ĝin, postulus ke ni unue solvu plurajn problemojn.

Ekonomio: La kosto estus pli alta ol nun. Kaj la ekonomio de SEF vere ne estas brila.

Supozeble necesus limigi la tradician parton de La Espero al nur 8 paĝoj, kompare kun la nunaj 8—12 paĝoj, kio jam estas limigo. Anstataŭe oni ricevus 4-foje jare svedlingvaj kromajn paĝojn.

Krom tio, ni certe devus peti konstantajn monkontribuojn de la membroj.

Redakcio: Necesus trovi pliajn redaktorojn kaj kunhelpantojn, kiuj inter alie respondecu pri elserĉado kaj tradukado de artikoloj el esperantaj revuoj.

Praktikaj detaloj: Multaj praktikaj detaloj devas esti pridiskutataj, ekzemple la poŝta distribuado kaj la prezo.

Ankaŭ necesus pli firme ol nun traŝirigi la adresregistraron kaj decidi ĉu sendi al iu gravulo la revuon dum la tuta vivo, kiel kontakti tiujn in-

SUK

Por pliampleksigi la sciencan literaturon en esperanto kaj samtempe por helpi al enkonduko de la Internacia Lingvo en la sciencajn kaj universitatajn mediojn, la Estraro de la asocio sen profita celo "Someraj Universitataj Kursoj" decidis krei novan serion de eldonaĵoj sub la nomo "SUK — Kajeroj".

En tiu-ĉi serio estos publikigitaj esperantlingvaj sciencaj verkoj, preferinde en la formo de universitataj lernolibroj. La SUK-Estraro decidis pri la eldono de certa verko laŭ jenaj kriterioj:

— la aŭtoro estu universitata aŭ samranga instruisto aŭ esploristo;

— la aŭtoro akceptu enhavan kaj lingvan kontrolon de la verko fare de alia(j) fakulo(j);

— la aŭtoro liveru la manuskripton laŭ la SUK-regularo pri eldono de tekstoj.

Ĉiukaze, la SUK-Estraro havos la rajton rifuzi eldonon de verko sen doni klarigon. La aŭtoro ricevos interkonsentendan tantiemon.

La SUK-Estraro esperas ke la subteno, precipe financa, al la Asocio kreskos kaj tiel permesos efektiviĝi tiun duan celon, gravan por la estonteco de la esperanto-movado. Kompreneble, paralele, la SUK-Estraro daŭrigos la eldonadon de la kurso-tekstoj kiuj rilatas la respektivajn SUK-sesiojn. **La SUK-Estraro**

NÄR KÖPTE DU EN ESPERANTOBOK SIST?

För egen nytta och nöje —
stöd esperantolitteraturen.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5

teresitojn kiuj ricevus la gazeton ktp.

KION VI PENSAS?

Ni (la subskribintoj) ŝatus scii la opinion de la membroj, aŭ per la gazeto aŭ rekte al la sekretariejo de SEF, pri tiu ĉi ideo.

Ulla kaj Franko Luin

Kultura laboro

John Widén



Nia samideano John Widén, multjara aktiva ano de la Esperantoklubo de Lidköping, dividis kun artistino la Kulturan Stipendion de Lidköping por 1973 (kvin mil kronoj).

Al John Widén tiu stipendio estis dediĉita pro lia multjara sindona laboro por la Arkivo de la Popolorganizaĵoj en Lidköping.

Jam antaŭ multaj jaroj vekigis — origine en laboristaj rondoj — la ideo kolekti antaŭ ĉio la historiajn dokumentojn, protokollibrojn k. t. p. de la sindikataj kaj aliaj organizaĵoj en unu centran arkivon en la urbo. Tiaj dokumentoj alie ofte perdiĝas kaj per ili perdiĝas grava peco da kultura historio.

Fakte jam dum la militaj jaroj alia samideano, Tage Sjöholm, komencis ordigi tian centran arkivon, sed post lia translokiĝo al Göteborg la arkivo estis dum multaj jaroj neprizorgata, kaj kiam John Widén antaŭ pli ol 20 jaroj transprenis la respondecon por ĝi, li devis refari la tutan laboron ek de la komenco.

Dum la paso de la jaroj li kreis vere altkvalitan arkivon, en agordo kun la sistemoj por similaj arkivoj aliloke en la lando. Nun ĉiuj plej gravaj popolorganizaĵoj aliĝis, kaj en la bretoj troviĝas nun vere tre valora historia dokumentado.

Sed ne sufiĉas tio: John Widén kreis ankaŭ unikan kolekton da magnetofonaj bendoj, sur kiuj konserviĝis la voĉoj de nun forpasintaj veteranoj, prelegoj faritaj kaj festaj okazaĵoj kiel jubileoj k. t. p.

Niajn legantojn certe interesas la informo, ke en la kadro de tiu arkivo troviĝas ampleksa esperantofako.

Temas ne nur pri protokoloj kaj aliaj dokumentoj pri la esperantovivo en la regiono; troviĝas tie unu el la plej grandaj kolektoj da esperantolibroj en nia lando, pli ol mil du cent ekzempleroj, multaj el ili ne plu akireblaj krom en arkivoj. La plej granda parto estas donacoj de forpasintaj samideanoj, i. a. Fritz Lindén, binditaj jarkolektoj de La Espero ek de 1935, La Revuo 1907—1921, kompletaj kolektoj de Malgranda Revuo k. t. p. John Widén kaj liaj helpantoj konstante bindas jarkolektojn de la plej gravaj esperantorevuoj. La kolekto ne funkcias kiel biblioteko, sed ĝi estas je dispoŝo por certaj celoj, ekz. esplorado aŭ havigo de informoj por gazetartikoloj.

La bendarkivo ankaŭ inkludas ampleksan esperantan parton, jen kelkaj voĉoj al kiuj vi povas tie aŭskulti: Einar Hult, John Stenström, Ivo Lapenna, Jan Ströme, Teo Jung, Alexander Starke, Jean Guillaume, Anna Alamo, Eizo Ito kaj multaj aliaj.

La arkivo estas nun ankaŭ kontrolata de la superaj instancoj de la svedaj arkivoj kaj oni rajtas kredi, ke ĝi nun estas tiel establita, ke ĝi funkcios bone ankaŭ post kiam finiĝos la agado de la ankoraŭ plene aktiva John Widén. Sed tiu duona kultura stipendio vere atingis bone merititan ricevanton, kiu grandparte post peza labortago en la porcelana fabriko preskaŭ sen aparta pago kreis kulturen institucion de senlima valoro. Kiel pensiulo li nun deĵoras en la arkivo (en la Popoldomo en la centro de la urbo) ĉiun ordinaran labortagon, kaj esperantistoj trapasante la urbon estas ĉiam bonvenaj rigardi.

Ake Blomberg

EDUKA EKSPERIMENTO EN KOLOMBIO

3 120 infanoj en Kolombio havos aktuale la eblecon evolui kiel kleraj plenaĝuloj laŭ la plena signifo de la vorto 'klara'; liberaj de antaŭjuĝoj kaj tabuoj, kapablaj naski kaj edukigi la nombron da infanoj deziritan de si, kaj konsciaj pri ilia rolo en la formado de siaj propraj vivoj kaj de tiuj venontaj generacioj, kiam ili akceptos plenan partoprenon en la evoluo de sia lando.

3 120 ne estas multaj, oni povus diri, el 10 milionoj da infanoj malpli ol 15-jaraj, kiuj konsistigas duonon el la aktuala loĝantaro de Kolombio. Tamen, jen komenĉigo, kaj se sukcesos la eksperimento, kiun nun faras la Ministerio pri Eduko pere de la Universitato de Studoj pri Loĝantaro (de la Universidad del Valle), kun teknika helpo de Unesko kaj financa de "UNFP" (Fonduso de Unuigintaj Nacioj por Priloĝantara Agado) aliaj miloj da infanoj ricevos en venontaj jaroj saman enkondukon en la vivon.

Post ne longe, ĉi tiu nova speco de instruo, kiu kombinas seksedukon kaj studon pri problemoj de la loĝantaro kaj medio kun tiu de la kutimaj temoj — naturaj sciencoj, biologio, geografio, hispana lingvo, religio kaj civitismo, povos ricevi ampleksigon ĝis la tuta kolombia edukistemo.

La celo de la eksperimento estas evoluigi en la infanoj, de la unuagrada lernejo supren, la konscion, kiel la konduto de la individuo havas sociajn kaj mediajn sekvojn rilate al la kresko de la loĝantaro.

La Okuloj

Mi sidis sola sur benko en la parko. Du junaj virinoj — petis permeson sidigi apude. Ili ĵus renkontigis. Unu el ili akompanis knabineton kun blondaj buklaĵaj haroj.

— Kiom granda kreskis Mimi! — diris la alia. — Kaj kiajn belajn okulojn ŝi havas!

Mi fiksas rigardon al la knabina kapeto. Du grandaj bluj okuloj kompletigis la belecon de Mimi.

La du virinoj tuj forgesis ŝiajn okulojn kaj ekbabilis pri diversaj okazintaĵoj. Tamen mi ne mallevis la rigardon de la ludanta antaŭ mi knabineto kaj ĉiam serĉis ŝiajn okulojn.

"Kion fakte prezentas la homaj okuloj?" — mi demandis min. Kaj tie, en la parko, ĉe mi naskiĝis la ideo ĉiam rigardi la okulojn de la renkontito kaj la homokuloj estiĝis por mi objekto de esploro. Dum tiu ĉi esploro mi estis surprizata de la fakto, ke neniam pli frue mi supozis kian grandan rolon ludas la okuloj en nia vivo. Ĉu vi demandis vin iufoje, ekzemple, de kio viviĝas la homovizaĝo? Unue de la okuloj kaj poste de la rideto.

Eble vi neniam pensis, kiom sennombre multaj estas la krucigantaj rigardoj, tiuj ĉi elektraj kurentoj, elirantaj el la homokuloj, sur la strato, en la kunvenoj, amuzvesperoj k.a. Kaj hejme? Ofte el la albumfotoj, el la portretoj, kroĉitaj surmure vin rigardas dekoj da paroj da okuloj de viaj proksimuloj kaj demandas vin, ĉu vi memoras ilin kaj ĉu vi plenumis honeste kaj digne iliajn testamentojn.

Eble vi ĉiuj havis okazon kune kun viaj amikoj travivi ĝojon aŭ suferon, skandalon aŭ katastrofon. Tamen vi ne turnis atenton al iliaj okuloj, sed perceptis la ĝeneralan mienon de la vizaĝo, de la parolo, de la gestoj. En via vivo vi sendube vidis kulpokonsciajn aŭ impertinentajn okulojn, malicajn okulojn, ruzajn aŭ mokantajn okulojn. Vi ĝuis ankaŭ infanajn okulojn el kiuj ŝprucas infana pureco kaj senkulpeco, pri kiuj la bulgara poeto Javorov diras: "Ne deziras kaj ne promesas ili, muziko kaj radioj en

du belaj okuloj, okuloj de infano". Similaj estis la okuloj de Mimi.

Ekzistas nigraj okuloj, "okuloj-ĉerizoj", bluj okuloj similantaj du plujajn montarajn lagojn, ekzistas okuloj scivolemaj, kiuj rigardas ĉin kaj vidas ĉion.

Ekzistas vivoplenaj, gajaj okuloj, ankaŭ humidoplenaj ĉagrenaj okuloj, ekzistas okuloj, kiuj en iuj momentoj esprimas koleron, ekzistas estingigantaj okuloj de maljunuloj, kiuj nenion promesas, kiuj estas plenaj de rezignacio antaŭ la venonta morto.

La okuloj estas belaj. Ili perceptas la eksteran mondon, esprimas la spiritan internan vivon kaj influas la ceterajn.

Ni posedas diversajn manierojn influi la homojn, ekzemple la parolon, sed la okulinfluo estas speciala.

En la okuloj troviĝas senbrua pozicio, arto signali, flirti, ludi, ami. La flamo de la amantaj okuloj traboras la koron de la knabino aŭ de la knabo kaj forrabas ilian dormon. La viroj kisas ne nur la lipojn, sed ankaŭ la okulojn de la amata virino.

En la okuloj mankas la melodio de la kanto, sed tiu ĉi muta arto manipuli per ili estas pli efika ol ĉiuj ceteraj artoj: la kantado, la aktora majstrecio, la oratora arto.

La okuloj serĉas, observas la varion de la naturaj koloroj kaj de la diversaj formoj de beleco. Pro tio ĉefe per niaj okuloj ni ricevas ĝuon: ni legas la plej belajn romanojn kaj poemojn, spektas la plej belajn filmojn, la plej belan baleton kaj la huntuajn pentraĵojn de famaj pentromajstroj. Laŭ nevideblaj kordoj la bildoj kaptataj de la okuloj atingas la animon kaj naskas tie emociojn, ĝojon aŭ suferon, amon aŭ timon.

Sen la okuloj nia spirita vivo estus multe pli malriĉa.

Ofte la okuloj estas maltrankvilaj: rigardante la horizonton, ili senpaciencie atendas la revenon de la fiŝistoj, de la maristo, de la aviadisto. Ĉe la stacidomo ili saltas de vojaĝanto al vojaĝanto por malkovri la atendatan konaton aŭ en la amaso de la revenintaj de la fronto soldatoj serĉas la filon, la edzon, la amaton, sed ofte vane, ĉar la atendato pereis sur la batalkampo. La okuloj de la patrino postenas super la malsana aŭ dormanta bebo, la soldato per fidelaj okuloj gardas la ŝtatlimon, la ĥirurgo faras plej subtilajn operaciojn en la homorganismo, gvidante de sia fidela kompas — la okulo.

Laŭ la okuloj ni rekonas la avarulon kaj la avidulon, kiam ili manipulas monon, oron aŭ riĉaĵojn. Pro tio ne vane la proverbo diras: la homa okulo estas nesatigebla.

La okuloj servas ankaŭ por memkonservado. La aglo per sia akra rigardo el ĉielalto vidas la surteran viktimon kaj kapturte plonĝas sur ĝin, la kokida patrino sinofere sin ĵetas al tiu, kiu atakas ŝiajn koki-

dojn, ĉar ŝi per siaj okuloj vidis la danĝeron kiu minacas ilin.

Ofte la okuloj esprimas la pensojn pli forte ol la vortoj. Ĉu ne la severa rigardo de la ĉefo, de la militestro, de la instruisto respektigas, kvankam la buŝo nenion diras? La patrino nur per unu rigardo fiksas sian infanon antaŭ la nekonataj homoj kaj la infano komprenas, kion ĝi devas kaj kion ne devas fari.

Ne nur la vortoj, sed ankaŭ la okuloj donas esperon kaj kuraĝon.

— Iru kuraĝe al la vasta mondo kaj estu feliĉa! — diris mia paŝo kiam mi dum mia juneco ekiris vojaĝi tra la mondo.

En ŝiaj okuloj brilis fido al mi, kaj tiu ĉi fido restis por ĉiam mia espero kaj kredo. Tiam mia paĉjo silentis, lia rigardo estis severa, liaj brovoj kuntiritaj kaj ĉio ĉi signifis riproĉon kaj malaprobon.

Certe vi konsentas kun mi, ke la okuloj posedas teruran forton. Vi ja scias, ke la sugestion kaj la hipnoton oni faras per la okuloj de la hipnotisto tra la okuloj de la hipnotito.

Mirinda estas la iriso de la okuloj. Malmultaj scias, ke tie kiel sur ekranon koncentriĝas elementoj kunligitaj kun ĉiuj niaj organoj. Laŭ tiuj ĉi elementoj ĉiu kuracisto, kiu praktikas la irisdiagnozon, difinas, kiuj organoj malsanas kaj pro kio.

Jen pro ĉio ĉi mi gardas miajn okulojn — la delikataj kaj valoraj organoj — kaj mi ne nur gardas, sed amas ilin. Mi amas ilin, ĉar tra ili penetras en min la konoj kaj la kulturo, kiujn mi posedas, ĉar per ili mi lernis silabi, ĝui, emocii.

Mi amas miajn okulojn, ĉar per ili mi ĝuas mian trijaran knabon, kiam li montras siajn tri fingretojn por diri, kiom da jaroj li aĝas.

Kaj mia amo al la okuloj estas natura kaj ĝusta.

MIRAIL SEKERGIEV

(Laŭda mencio en Beograd en 1973)

DENNA MÅNAD REKOMMENDERAR VI:

STELLAN ENGHOLM:

Al Toronto	14: 40
Infanoj en Toronto	15: 60
Junuloj en Toronto	20: 90
Vivo vokas	11: 75

TIBOR SEKELJ:

Tra lando de indianoj	28: 25
inbunden	35: 30

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578

Ne nur por vi . . .

**Klubo,
utiligu la fortojn
kiuj troviĝas
meze inter ni!**

SVEDA RAPSDIO

Ni havas la plezuron informi ke nia pianista samideano Roland Dupuis, prelegisto aprobita de la Supera Direkcio de Instruado (Skolöverstyrelsen) ellaboris novan koncertoprelegon aldona al sia jam ampleksa repertuaro. Ĝia titolo estas "SVEDA RAPSDIO".

Tiu programo, same kiel la aliaj, estas prezentenda franc-, sved- kaj esperantlingve laŭ la cirkonstancoj.

Ĉiuj temoj de Roland Dupuis nun entenas almenaŭ aludon al esperanto; aludon despli simpatie akceptatan de publiko, ĉar ĝi estas same trafa kiel diskreta; neniel ĝi ŝajnas esti propaganda.

Ĝuste tio faras tiun svedan rapsodion aparte valora, kaj por ni mem esperantistoj, kaj por "eksteruloj".

Ĝia unua ĉapitro temas tute pri junulo (la aŭtor-artisto) kiu "malkovris" Svedujon per nia mondkongreso en Stokholmo en 1934. Konsistigas la prezenton: parolo, pianludo, kanto kun memakompano, kaj koloraj lumbildoj, ĝuste laŭ la konata stilo de Roland Dupuis. La elektitaj, cetere elitaj, komponistoj estas Hugo Alfvén, W. Peterson-Berger, Josef Eriksson, B Gustafsson, L. Widén kaj W. Stenhammar.

Ni varme rekomendas ke ĉiaj societoj, eventuale kun helpo de studorganizaĵoj kiel ABF, TBV, SKS, k.t.p... okazigu prezenton de tiu SVEDA RAPSDIO.

Oni povas turni sin al R. Dupuis (08) 41 85 82 plej certe 8.00—9.20.

A. B.

RUMANIO

Tiberio Morariu, nia konata literaturisto kaj kunlaboranto, havas nuntempe, kiel pensiulo, ankaŭ eblecojn viziti la klubojn por prelegi. Jen kelkaj temoj:

Progresanta Rumanio — priskribo pri la evoluo de primitiva agrara lando al moderna industria ŝtato. Kun lumbildoj.

Rumana bonhumoro — Morariu laŭtlege amuzajn rakontojn. Ankaŭ originalajn poemojn verkitaj de rumanaj esperantistoj. Sen lumbildoj.

Epizodoj el la vivo de verda veterano. — Morariu rakontas precipe bonhumorajn epizodojn el sia propra vivo.



Tiberio Morariu kun filino Dorica dum la prelego en Jönköping.

Kiel vi eble scias, Tiberio Morariu alvenis al nia lando kiel kursgvidanto laŭ direktmetodo. Li lernis de la majstro mem de tiu metodo, pastro Andreo Cseh. Kiel Cseh-instruisto li ekzercis la arton krei kontakton kun la geaŭskultantoj, kaj li estas tre vigla bonhumora preleganto, speciale kiam temas pri la du laste menciitaj temoj, kiuj perfekte konvenas al lia temperamento. Ke Morariu krom tio apartenas al niaj plej lertaj lingvistoj kaj uzas modelan esperantan lingvon, pri tio bone scias ĉiuj esperantistoj kiuj iam havis kontakton kun li.

Estas eble — eĉ konvene — aranĝi ekzemple prelegon pri Rumanio laŭ ĉi-supre, kun lumbildoj, kaj poste — ekzemple ĉe la kaftablo — eluzi unu el la aiaj temoj.

Kontakti rekte S-ron Tiberio Morariu, Göttaforsvägen 1, 124 30 Bandhagen, tel. 08-86 50 68.

Varme rekomendas

Ake Blomberg

VÄSTERÅS Esperantoklubb

söker kontakt med andra klubbar för utbyte av idéer, medlemsblad, ömsesidig hjälp med visst sorts arbete etc. Vi är intresserade av "hur ni gör" och delar beredvilligt med oss av vad vi själva gör. Som t. ex.:

— Ni får väldigt gärna låna vår utställning, som nu turnerat redan på ett tiotal platser i Mellansverige. Villkor för utlåningen är endast att den lånande klubben ombesörjer transport ena vägen och fräschar upp ev. skador. (Men flera av de lånande klubbarna har dessutom bidragit till kostnaderna genom ett kontant bidrag på några tior — men detta är frivilligt!)

— Vissa av våra affischer från denna utställning har vi låtit utföra kopior på i ungefär storlek A 0. Dessa säljer vi till intresserade för självkostnadspris — 10 kr. st. De som finns är:

"Esperanto-vägen"

"Språk och imperialism"

"Behöver vi fler språk, när det redan finns 3 000?" (2 ark 20 kr)

"Språk som skiljemur eller som bro"

"Zamenhof-frimärket"

— Dessutom håller vi på att färdigställa en enkät på ett dubbelsidigt A 4 avsett att lämnas till icke-esperantister, dels för att undersöka deras inställning till vårt språk och dels för att få dem att "tänka" i litet mer positiv riktning.

— Vi håller också på att ta fram en bomullströja med en grön stjärna och vit (utsparat) text "esperanto" i denna. Tröjan kommer att finnas i både barn- och vuxenstorlekar, men priset är svårt att säga, då chockhöjningar vidtagits från producenthåll. Troligt prisläge mellan 15 och 20 kr.

Utställningen kommer att sättas upp i Borlänge under årskongressen av medlemmar ur Västeråsklubben. Affischerna, enkäten och tröjorna kommer att finnas till salu eller att beställa där.

Västerås Esperantoklubbens kontaktman är sekr. Wim Posthuma, Soldatgatan 40, 723 45 Västerås. Telefon 021/13 35 29.

Ĉu estas ia surogato por dio?

Estas malfacile diri kie ĝi komencigis. Ĉu ĉe Gutenberg, kiam li prezentis al la okcidenta mondo la presadon? Ĉu ĉe Galileo, kiam li faris tiujn revoluciajn eltrovojn? Ĉu pro la industria revolucio? Ĉu pro darvinismo. Ie survoje la okcidenta homo komencis perdi sian kredon pri Dio kiel persona potenco, kiel direktanto je lia sorto, kiel fina juĝisto je liaj agoj. La ideo, ke Dio kreis la mondon fariĝis eksmoda; ni evoluis. La koncepto pri infero estis pitoreska, sed jam ne deviga. Oni komencis vidi la vivon kiel pli-malpli hazardan; peko fariĝis relativa sociologia afero, kaj por multaj ĝi estis pura fikcio. Post jarmiloj da vivo vado sub la regado de dioj, la homo komencis konsideri tiajn kredojn kiel arkaikajn kaj superstiĉajn. Simile al filo, kiu decidas, ke jam ne necesas dependi de la patro, kaj ke estonte li gvidos sian propran vivon.

Estas teruraj konsekvencaj rezultoj de la misaŭgura salto de la homo en la materialismon. Liberiginte sin de la infero, li perdis sian esperon pri la ĉielo. Vi vivas, vi mortas, li diris, kaj fino! Via avo posedis grandan respekton pri vivo eterna; vi, tipe dusenca, esperas, ke tio estas ankoraŭ vera, sed viaj idoj estas tute senesperaj, krom por tio, kion ili materialisme povas akiri el ĉi tiu vivo.

Plue, se la homo estas sia propra morala juĝisto, kaj registaroj derivas sian potencon el la konsento de la regatoj, efektive ekzistas do nenia reala aŭtoritato. Malantaŭ vi kaj mi staras la registaro, kiun ni kreis, kaj malantaŭ la registaro estas nur la papilo. Infanoj naskiĝas al gepatroj ne kiel parto de ia dia plano, sed pro biologia akcidento. Ĉu tiu akcidento investas la gepatrojn per ia aŭtoritato? La instruisto scias pli ol la lernanto, sed ĉu tio fakte donas al li ian privilegion? La policanoj, kiuj devus reprezenti aŭtoritaton, oni nomas "porkojn". La junuloj rikanas al siaj politikaj gvidantoj, bruligas la flagon de sia propra nacio, kaj flirtigas tiun de la malamiko, kaj kial ne, se ekzistas nenia aŭtoritato?

Estas signifoze, ke la ideo, ke la homo morale responsas nur al si mem, estas la sama ideo, kiu naskis tutajn novajn sociojn: komunistan, faŝistan, socialistan, kaj tutan gamon da aliaj intergradaj — dum la pli malnovaj socioj estas skuataj kaj ŝanĝas sian naturon, malgraŭ tio, ke ili retenas la malnovajn nomojn kaj formojn.

En la novaj socioj speco de moraleco estas konstruita ĉirkaŭ la protekto je la ŝtato, en kiu ŝajnas esti konstanta krizo. Sed tio ne povas daŭri. Jam hipioj turmentas la aŭtoritatojn en landoj, kie la libero jam malaperis, kaj malantaŭ la diversaj kurtenoj ni aŭdas protestojn pri la sensignifo de la vivo.

Eble neeviteble, kiam la homo jam ne bezonas peti Dion por sufiĉa manĝaĵo kaj protekto kontraŭ la elementoj, li ĉesas peti Dion.

Samtempe kun satigo pri siaj materiaj bezonoj, ĉiuj popoloj ŝajnas atingi la stadion, en kiu la okcidenta socio nun sin trovas.

Tamen la demando ankoraŭ restas. Iu, kiu povas kontempli la okulon de muŝo, la mekanikojn de la homa fingra manipulado, la kamuflon de la faleno, aŭ la konstruon je ĉiu speco de materio el la variaĵoj en la aranĝo de la fundamentaj protonoj kaj elektronoj, kaj ankoraŭ insisti, ke ĉi tiu universo simple okazis sen plano kaj sen planinto per absoluta akcidento — tia persono kredas miraklon milfoje pli konsternegan ol iu ajn miraklo raportita en la Biblio.

Konsideri la homon, kun liaj artoj kaj aspiroj, lia konscio pri li mem kaj la universo, liaj emocioj kaj liaj moralaj, kaj ĝuste lia kapablo koncepti ideon tiel grandiozan, kiel tiu pri Dio; konsideri la homon ne kiel kreitaĵon, sed nur kiel ian formon de vivo iom pli altan sur la evolua ŝtuparo ol la aliaj — tio estas krei demandojn pli profundajn ol tiuj jam responditaj.

Ĉu ne estas pli da utilo por la mirige kompleksa homa cerbo ol certigi la daŭran ekzistadon de la specio? Ĉu ni ne povas percepti en la kapabloj de la cerbo iun funkcion pli gravan ol la nura memkonservado?

Se ĉiuj specioj penas konservi sin, kiu sencerba senanima kemio kreis ĉi tiun mirindan impulson? Se la universo estas limigita, kio ekzistas trans tiu limo? Kio ekzistas antaŭ ol la universo komencigis. Se ĝi estas senlima kaj eterna, ĉu ne estas super nia kapablo iam ajn scii?

Elementaj lernejoj demandoj, ĉu ne? Jes, sed nia materialismo estas mem tiel malprofunda, bazita sur krudaj supozoj, kiuj estas apenaŭ pli ol simpla divenado, malalloga kaj nekontentiga; malnobliga, flagre nekompleta, sed ankoraŭ aroganta en siaj premisoj.

La ideo pri Dio meritas pli bonan surogaton!

(El Aŭstralia Esperantisto)

Ni lernu per la eraroj

"Ni povus aranĝi kluban kunvenon lundon la 11-an, aŭ marton (?) la 12-an de februaro." En tiu ĉi esprimo estas skriberaro.

Marto estas la tria monato de la jaro.

Mardo estas la dua tago de la semajno inter lundo kaj merkredo.

La ĝusta esprimo estas: "...lundon la 11-an, aŭ mardon la 12-an..."

T. M.

ATENTIGO

En la 5-a n-ro de via ŝatata revuo por 1973 sub la titolo "Postkongreso en Primošten" mi trovis kelkajn erarojn pri kiuj mi volas atentigi.

En la titolo mem mankas la supersigno sur la litero "š" de Primošten, sed tion verŝajne kaŭzis manko de esperantaj supersignitaj literoj por titoloj.

Sed aliaj eraroj koncernas popolon kaj geografiajn nomojn monstre misformitajn, kvankam en la teksto aliloke ne estis ortografiaj problemoj:

1) Ĉeko estas "pagordono, per kiu la subskribanto ordonas al sia banko", sekvante ĉeka estas io rilatanta al ĉeko. Operkantisto povas esti nur ĉeĥa, au se vi volas eviti la supersignitan ĥ, ĉiu komprenus ankaŭ se vi skribus ĉeĥa, ĉar nenia miskompreno povas okazi. Mi persone ne komprenas, kial la ĉeĥoslovakoj kaj rusoj insiste uzas ĥ en ĉiuj personaj kaj geografiaj nomoj, kie ajn estas aŭdebla "h"; eble ili opinias ke en esperanto simpla "h" estas muta litero?!

2) La unuan fojon en la vivo mi la nomon de mia lando, Jugoslavio, vidas arbitre skribite "Jugoslavak-ujo".

3) En Jugoslavio, ne malproksime de Primošten, ekzistas rivero KRKA, kiu havas akvofalojn, kaj ĝian nomon oni ne povas ŝanĝi al KERK, aldonante la literon E kaj forglutante la finan literon A — ĉio tio ne estas nur ortografia kaprico, sed ĉiu litero prezentas apartan, bone aŭdeblan sonon, ĉar en mia lingvo la ortografio estas strikte fonetika, same kiel en esperanto.

4) Ŝibenik estas urbo kiun neniu en la mondo iam ajn skribis aŭ prononcis ZIBENIK.

Mi estus al vi tre dankema, se vi dediĉus iom da spaco en via alte taksata revuo por tiuj ĝustigoj.

Antonije Sekelj
Beograd

Veteranoj forpasis

Carl Hallros, Motala, mortis la 27-an de februaro, 73-jara. Dum 50 jaroj li fidele agadis por Esperanto, kaj li estis unu el la fondintoj de la klubo en Motala. Ni kun danko memoros lin.

A. S.

Albin Bengtsson, Skövde, mortis komence de februaro. Li estis unu el la plej malnovaj membroj de la Klubo Esperantista de Skövde.

Lila Wiltshire, edzino de la vic-ĉefdelegito de UEA en Nov Zelando, forpasis. Ŝi kaj ŝia edzo vizitis dufoje Svedujon, i. a. Lidköping, kie ili ambaŭfoje estis dum pluraj tagoj gastoj de gesamideanoj kaj partoprenis klubajn renkontiĝojn. S-ro Wiltshire konservas ankoraŭ la kontakton kaj regule legas La Esperon.

Karin Olsson, membro de la klubo en Malmö, mortis en januaro 1974.

Bankoficisto **CARL MUNTZING**, Gävle, mortis 78-jara. Dumlonge li estis fidela ano de la Esp.Klubo en Gävle. Antaŭ 28 jaroj li fondis la Filatelian Societon de Gävle kaj estis samlonge ĝia prezidanto. Li estis aktiva ankaŭ sur la geneologia kampo.

Ni sendas nian koran kunsenton al lia vidvino, s-ino Gertrud Muntzing.

T. M.

Memore al Torsten Eliasson

Hästveda

1915—1973

*En Jämnhult la arboj susuras:
La jaro kaj Vi pasis for.
Por Vi la mallumo krepuskas,
nun batas ne plu via kor'*

*Seĝo malplena staras
en klubo de Hästveda nun,
la sortovolo deklaras,
ke Vi restu for de la sun'*

*Ni sentu foreston, amikoj,
ni certe memoros ja Vin.
La homo sen ĉiuj implikoj,
jes, tia memoros ni Vin.*

*Vi ripozas sub verda monteto
post longa kaj streĉa laboro.
Ni dankas pro ĉiu penseto,
kiu venis de nobla koro.*

*Ni dankas pro jaroj pasintaj,
pro laboro kaj jaroj amase.
Ni dankas pro horoj flugintaj,
pro vortodiroj emfaze.*

*Ripozon Vi havu trankvilan,
Vi faris ja multon dum vivo.
Ni levu la torĉon tre brilan
de sub la profunda deklivo.*

Herbert Lindros

RADIO

RADIO ZAGREB

informas, ke ĝia elsendo por esperantistoj (ondolongo 264 m) okazos ek de la 8-a marto **vendrede** — ne plu jaŭde — 5 minutojn post la nokto-mezo laŭ **MET** (fakte, 0,05 en la sabata mateno!).

La ŝangon sugestis la kroata esperantista junularo argumentinte, ke sabato estas por multaj libera tago kaj la nokto vendredo/sabato pli konvenas por aŭskultado de malfrua elsendo.

RADIO ROMA - ESPERANTO

Casella postade 320

I-00100 ROMA (Italujo)

Redakoro: doktoro Antonio DE SALVO, via Olbia 15, I-00182 ROMA (Italujo). Por urgaj sendaĵoj bv preferi uzi la privatatan adreson de la redaktoro.

Kunlaboras: f-ino Mirella MERLANI kaj d-ino Vera di TOCCO.

La programo okazas ĉiun dimanĉon, de la 21a horo ĝis la 21-a kaj 20 minutoj (laŭ mezeŭropa tempo) sur tri ondlongoj, respektive je metroj 30,90—41,24—50,08, tio estas kilohercoj 9.710, 7.275, 5.990.

La elsendoj temas pri "Novaĵoj el Italujo" (informoj pri la itala vivo, kaj pri internaciaj eventoj en rilato kun Italujo), "Leterkesto" (korespondado kun la aŭskultantoj), kaj "Kuriero de Esperanto" (informoj pri la esperanto-movado, kaj ĝenerale pri lingvaj problemoj).

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

Nikolao Kopernik

Laŭ informo de s-ro Edmond Plutniak, Lievin, Francio, ilia ekspozicio pri Kopernik estis sukcesa. Oni anoncis konkurson por infanoj ĝis 16-jaraj pri la temo "Nikolao Kopernik rigardata de infanoj".

En Beograd pasintan jaron s-ro Plutniak petis min havigi kelkajn desegnaĵojn el Svedujo. Mi skribis al kelkaj geinstruistoj kaj petis helpon sed bedaŭrinde ne havis eblecon kontroli, ĉu iu sendis.

En ĉiu okazo ili ricevis pli ol 1.500 desegnaĵojn el diversaj landoj, kaj la franca televido faris filmon pri Kopernik per helpo de tiuj desegnaĵoj kaj jam du-foje prezentis la filmon en sia nordfranca programo.

La ekspozicio nun migradas en Francio kaj poste 500 el ili estos donacataj al la esperantogrupo de Torun, la naskiĝurbo de Kopernik.

Märtha Andreasson

Ĉe Simono

ĈE SIMONO, Esperantoplatsen 5

Pasintan dimanĉon nia familio vizitis tre belan restoracion en Gotenburgo. Ni ne pli frue vizitis tiun restoracion kaj nun faris tion ne malpli pro la fakto, ke ĝi situas ĉe la jam multjara Placo de Esperanto en nia urbo. La restoracio mem situas en la eleganta banka palaco de Skandinavia Banko, konstruaĵo en blanka marmoro.

Oni povas elekti kiun ajn el la du sekcioj, tiun de memservado aŭ tiun de prizorgo per geservistoj. Ambaŭloke oni servas tre bonkvalitajn, delikatajn manĝaĵojn. Ni estis tre kontentaj. En la laste menciita sekcio oni povas trinki botelon da vino aŭ — se oni preferas — ankaŭ pli fortajn alkoholaĵojn.

Nia dimanĉa tagmanĝo estis tre sukcesa. Al gotenburgaj esperantistoj, same kiel al ĉeokazaj gastoj en la urbo, ni rekomendas la restoracion. Fakte ni kun plezuro rememoras la viziton ĉe Simono, ne malpli ĉar la restoracia fakturo per sia surpriso Esperantoplatsen / atestas, ke dank' al serioza decido pri Esperantoplatsen la urba aŭtoritatoj montras respekton al La lingvo internacia.

Kun saluto:

Iva kaj Lennart Åberg
kun gefiloj Ellen kaj Per

Ĉu hodiaŭ

*Letera tempo je la deknua.
Alproksimiĝas konataj paŝoj
de leterportisto —
io falas sur la plankon
de la halo.*

*Mi hastas,
la koro batas
— — — eble? — — —*

*Sed ne,
nenio de Vi, mia suno, nur de aliloke.
io falas sur la plankon.
Malĝoĝigas mi.*

*La paŝoj alproksimiĝas,
io falas sur la plankon.*

*Mi hastas,
la koro batas
— — — eble? — — —*

*Jes vere, inter kelkaj,
letero de Vi,
dika letero
kun gracia tenera skribo
surkoverte.*

*Pleniĝas mian koron
ĝojo emocia.*

*Malfermas febre,
legas avida,
larmas ĝuas*

kisas Viajn pensojn.

Jim Hornö

Bonhumoro

— Kiu estas? kriis sinjoro Svensson, kiam li aŭdis iun kaŝiri ekstere en sia malluma vestiblo.

— Ŝtelisto, estis la respondo.

— Kion vi faras?

— Serĉas monon.

— Vere? Venu, ni serĉu kune.

★

INTER FRAŬLINOJ

— Kaj hieraŭ li metis sian brakon du fojojn ĉirkaŭ mian talion.

— Ĉu li efektive havas tiel longajn brakojn

★

— Hieraŭ mi parolis kun la ĉefministro en la telefono.

— Kion la ministro diris al vi?

— Li diris: Pardonu, mi prenis eraran numeron.

NI LERNU PER LA ERAROJ

"Pluraj kursoj komencitaj dum la aŭtuno, estos daŭrigataj dum la printempa semestro (?). "La lasta vorto en ĉi tiu frazo estas malĝusta.

Laŭ Plena Ilustrita Vortaro p. 972, "Semestro" = ½-jaro. Ekz. Registriĝi sin por la kursoj de la unua duonjaro. (Sem-estro = Esp.kursgvidanto, kiu semas Zamenhofajn stelojn... T. M.)

PIV p. 1135: "Trimestro" = Periodo de tri sinsekvaj monatoj de la lerneja jaro. Ĝi enhavas nur tri trimestrojn.

La ĝusta formo de la komenca frazo: La kursojn komencitajn dum la aŭtuno oni daŭrigos dum la printempa sezono.

T. M.

Ere — parkere

1. Vortojn ŝparu, agojn faru!

2. Dancu diabloj, sed ne en mia arbaro

3. Eĉ bagatelo povas servi al celo

4. Tuso kaj amo ne estas kaŝeblaj

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack,
200 42 Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:

merkredo 10.00—11.00

ĵaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Strönné

Tel. hejma 040 / 12 92 11

Prez. Sven Sjöblom

La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,
Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.
Hägervägen 31.

Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.

Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-286 42 (arb. 0510-221 30).

Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr, ungdom 10 kr, familjemedlem utan tidning 5 kr.

Prenumerationspris 20 kr.

Förbundets sekretariat är öppet
onsdagar kl. 18—20, tel. 08-48 99 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1974

Bilaga medföljer

Deltagaravgifter för Svenska Esperantoförbundets årskongress i Borlänge 1–3 juni 1974

För deltagare i alla arrangemang:

Inklusive kongressavgift, två övernattningar, två frukost, två lunch, supé samt utflykt med kaffe och tésupé.

cod
 i dubbelrum 205: - B1
 i enkelrum 225: - B2

för SEJU-medlemmar:

i dubbelrum 100: - B3
 i enkelrum 120: - B4
 är ni vegetarian sätt X i rutan V

För deltagare i enstaka arrangemang:

Kongressavgift obligatorisk. cod
 Ej SEJU-medlem 25: - K
 SEJU-medlem 10: - Ks
 Dubbelrum pr person o natt 35: - D
 Enkelrum pr person o natt 45: - E
 Frukost 5: - F
 Lunch 25: - L
 Supé, Bankett pingstafton 40: - S
 Utflykt med kaffe o tesupé 35: - U
 Är ni vegetarian sätt X i rutan V

Var vänlig utsätt namn på ev. medbeställare eller person, med vilken ni önskar sammanbo, samt uppgift om vilken natt och dag (vid beställn. av enstaka arrangemang) ni önskar deltaga å inbetalningskortets baksida.

POSTBANKEN POSTGIRO

Mottagardel

INBETALNING / GIRERING B Arkivdel

Meddelande till betalningsmottagaren

Härmed beställes

Cod	B1	B2	B3	B4	K	Ks	D	E	F	L	S	U	V
antal													

Namn å medbeställare eller med vem ni önskar sammanbo
 Samt uppgift om tid för deltagande vid delbest. å omst. sida

Avsändare (namn och postadress)

Till postgirokonto nr

81 01 74 - 3

Avgift

Betalningsmottagare (endast namn)

Esperantokongressen 1974

Redovnr

Avsändare (namn och postadress)

Eget kontonr vid girering

Underskrift vid girering från eget konto

Till postgirokonto nr

81 01 74 - 3

Kronor

öre

Kronor

öre

Tidningsbilaga

I FÄLTET NEDAN FÅR ANTECKNINGAR INTE GÖRAS - RESERVERAT FÖR MASKINELL LÄSNING

Bl 2021.04 (Mars 74)

#

8101743#02#